ANTAŬEN suplemento de Informilo 3/15 SEPTEMBRO 2007

**Enhavo:**

Pri balotrajto, ĈEP en Mielno, Vizito en Pilseno,
Invitilo al franca renkontiĝo, La feliĉo estas vojo, Kiel porko helpis.

Pro multaj pluaj mesaĝoj la redakcio utiligas ankaŭ tiun ĉi suplementon por informi niajn legantojn.

# Kion vi scias havante balotrajton?

La ĝenerala balotrajto en nia lando estis lanĉita en la jaro 1907, sed nur por viroj! Egaleco de seksoj komenciĝis nur de la jaro 1918. La unua lando kun egalaj balotrajtoj por virinoj kaj viroj estis vakera ŝtato Wyoming en Usono de la jaro 1890. Kompare kun tio la Svislando permesis al virinoj baloti en federalaj balotoj nur en la jaro 1971 !

Estonio estas la unua lando, kie oni povas de la jaro 2007 voĉdonadi en parlamentajn balotojn pere de interreto. Tiun ĉi eblon uzis 30.000 civitanoj. En aliaj ŝtatoj tielmaniere oni povas voĉdonadi nur en lokaj kaj komunumaj balotoj. Onidire en estonteco ni povos voĉdoni pere de SMS poŝtelefone.

La aĝo de voĉdonantoj iom post iom malaltiĝas. Tio okazis post la dua mondmilito. La aĝo por balotrajto sinkis de 21 jaroj al 18 jaroj. Eble jam venas plua ondo – en Aŭstrio ekzemple la limo por voĉdonado al parlamentaj balotoj



estas 16 jaroj. En Norda Koreio, en Nikaraguo, en Orienta Timoro, en Kubo balotas deksepaj aŭ deksesaj voĉdonantoj. Male en Vatikano – la papon oni povas elekti nur kardinaloj ne pli aĝaj ol 80 jaroj. Simile en Brazilo civitanoj pli aĝaj de 70 jaroj ne estas devigaj voĉdoni, sed kompreneble povas.

Proksimume en 30 ŝtatoj ekzistas devo baloti. Klasika ekzemplo estas Belgio, kie oni mone punas nevoĉdonantojn. En Eŭropo havas devon voĉdoni la civitanoj en Grekio, Luksemburgio kaj Cipro. Sen puno ekzistas devo voĉdoni ankaŭ en Italio.

El diversaj lokoj kolektis Jindřiška Drahotová, Ĉeĥio

# ĈEP en Mielno

En la tagoj 12. – 20. 6. 2007 jam la 29-an Ĉebaltan Esperantistan Printempon en bela ripozcentro en pola urbeto Mielno partoprenis 75 esperantistoj el 12 landoj.

Sporta hotelo estis komforta kaj ni povis ĝui interesan programon. Post la solena malfermo kaj salutvortoj de landaj reprezentantoj okazis interkonatiĝa vespero kun danco. Ni vidis fotojn el UK en Florenco kaj el pasintaj renkontiĝoj en Mielno.




La prezidanto de Pola Esperanto-Asocio Stanislav Mandrak montris al ni novan rektan metodon de instruado, kiun kreis s-ano Marček el Slovakio. Okazis du busaj ekskursoj al Kolobrzeg kaj al Koszalin. Al ni tre plaĉis vespero de eŭropa humuro kaj granda tombolo, kie ĉiu ion gajnis. Vespere okazis prelegoj de la partoprenantoj. Mi prelegis pri seminario en Skokovy kaj pri SET en Lančov kaj montris videofilmon pri UK 1996 en Prago. La aranĝo finiĝis ĉe bivakfajro.

La ĉefa organizanto s-ano Czesław Baranowski vin invitas al venontjara jam 30-a renkontiĝo ĉe Balta maro kaj ĉe la lago Jamno. Vi, kiuj volos partopreni venontjare, povas ricevi informojn ĉe: fmisa@wscnet.cz . fili

## Pilsena vigla kunlaboro

Meze de la aŭgusto efektiviĝis en Pilseno vizito de franca sinjorino el Tours. Tute normala afero por ni ĉiuj, sed escepta en la punkto, kiu atestas pri nekutima fakto. La pilsena klubo kunvenadas kaj laboras eĉ dum la ferioj.
Sufiĉis kelkaj interparoloj pere de telefono kaj klubejo estis plenplena je geamikoj. Tuj ekregis bonhumora babilado, enhavanta ankaŭ valorajn informojn. Kredu, ke la kunlaboro inter ni ekzistis kaj ekzistas. Ni povus inspiriĝi de niaj francaj gesamideanoj. Ili, ekzemple, tradukas tekstojn por la oficejoj, muzeoj ktp. komune en la klubejo helpante unu al la alia kaj surloke korektas ilin. Utila kaj tutcerte amuza kunlaboro regas tie, ĉu ne? Věra Muchnová

Invitilo:

## Mediteranea Esperanto- Semajno

okazos de la 1-a ĝis la 8-a marto 2008

La restadejo estos preparota en komforta hotelo "Le Renouveau" en Agay (c'e Saint-Raphael). Francio.Dum ankoraù frostos en via regiono, venu al la Mediteranea maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj. Atendos vin amika, familia etoso .

Gvidantoj estos: 1a kurso: Josee LAFOSSE .
2a kurso: Jean Pierre BOULET
3a kurso: Claude PIRON

Posttagmeze vi povos elekti el la programo: promenado, piedirado en Esterel (kunportu viajn turistajn ŝuojn), familia vivo ĝis la vespero: Distraĵoj . Raphael). Francio

.Aliĝilo: 55 eùroj ( familia aliĝilo : 100 eùroj), informoj kaj aliĝoj: Monique Prezioso, 92 Impasse Jean Moulin, 83700 Saint-Raphael, prezmoni@hotmail.com ; 0033 (0)4 94 83 06 88 aŭ Christine Graissaguel, Les Iles d'Or, Rue du progrès FR 83600 Frejus Tel.:0033(0)

## Propagado de Esperanto

okazis en la tagoj 5. 8. kaj 8. 8. 2007 en ĉiuj regionaj stacioj de la Ĉeĥa radiodisaŭdigo en la programo "Ĉeĥio – la lando nekonata- Brno" (Brunno). La trikvaronhora relacio pri Verda stacio en Brno estis tre sukcesa, tre interesa. Tamen nia redakcio ne konas la aŭtoron. Interesiĝantoj povas la artikolon trovi en http://www.rozhlas.cz/olomouc/kultura/_zprava/366274 .

## La feliĉo estas vojo ....

Ni konvinkas nin, ke la vivo estos pli bona, kiam ni edziĝos aŭ edziniĝos, kiam ni havos unuan infanon, poste la pluan.



Poste ni estas ne tro feliĉaj, ĉar niaj infanoj bezonas multe da nia zorgemo kaj ni antaŭĝojas, ke ĉio estos pli malĝena, kiam ili estos pli aĝaj. En plua tempo ni denove ne estas kontentaj, kiam ili estas jam pli plenkreskaj kaj ni ne devas zorgi pri ili. Ni opinias, ke ni vivos pli harmonie, kiam ni havos pli belan aŭtomobilon, kiam ni forveturos libertempi, aŭ kiam ni finfine pensiiĝos.

Sed la vero estas jena; ne estas pli taŭga tempo por esti feliĉa ol ĝuste nun. Se ne nun, do kiam? Nia vivo estos ĉiam plena de problemoj. Estas pli bone tion scii kaj senti sin feliĉa, ol senĉese atendi je ia feliĉo en la vivo. Sed survoje al la feliĉo ĉiam aperadas iuj obstakloj. Aŭ problemo, aŭ laboro kiun oni devas fini, tempo kiun ni devas al iu dediĉi, mono kiun ni devos pagi ktp.

Finfine mi konstatas, ke la vivo estas plena je problemoj. Dank´ al tiu scio ni komprenas, ke al la feliĉo gvidas neniu vojo. Feliĉo estas ĝuste la irata vojo, ne celo de la vojo. Do, travivu bone ĉiun momenton de sia vivo.

Ne estas pli bona momento esti feliĉa ol nun.

## Solidareco

. Antaŭ iu tempo staris sur la starto de olimpiaj ludoj en Seatle naŭ atletoj, ĉiuj mentale aŭ fizike handikapitaj. Eksonis pafo kaj vetkura konkurso komenciĝis. Oni kuris triope; subite unu knabo stumblis, falis kaj ekploris. Ok aliaj konkurantoj aŭdis lin, ili malrapidis kaj rerigardis. Ili haltis kaj ĉiuj revenis.

Apud la knabo sidiĝis knabino kun Downa sindromo, ĉirkaŭbrakis lin kaj demandis lin: „Ĉu vi sentas vin jam pli bone?" Poste ĉiuj naŭ komune trapasis la cellinion.. Ĉiuj rigardintoj tiam ekstaris kaj aplaŭdis. La aplaŭdo daŭris longe, longe…

La homoj, kiuj tion vidis, senĉese parolis pri tio. Kial? Ni bone scias, ke kiam ni mem ion gajnos, tio ne estas en nia vivo la plej grava. La plej grava afero estas helpi al ceteraj por gajni. Eĉ se tio signifus, ke ni malrapidos kaj ŝanĝos nian propran konkurson.

Nekonata aŭtoro

## Kiel porko helpis kapti ŝtelantojn.

En regiona bieno oni bredis bovojn. La farmistino fieris je sukcesoj en bredprosperoj kaj baldaŭ pri ŝiaj entreprenaj rezultoj skribis ne nur loka gazetaro. Ŝi nevole malkovris al unu engaĝiĝanta trudiĝema raportisto, ke la plej laktoproduktantajn bovinojn ŝi bredas en speciala stalo preskaŭ en luksaj kondiĉoj. Pri la detaloj de ekipo en ĉi tiu stalo mi ne volas skribi, sed la menciata gazetara raporto kaŭzis envion en la vicoj de bovbredistoj.

Grupo de ruzuloj en najbara vilaĝo decidiĝis, ke ili ŝtelos la kvalitajn laktoproduktajn bovinojn kaj elpensis planon, kielmaniere tion fari.. Ili prizorgis 6 parojn da gumbotoj, sufiĉe grandnombrajn, por neniigi postsignajn spurojn de 3 bovinoj. Dumtage la bovinoj paŝtis sin sur proksimaj paŝtejoj kaj ĉiam la gregon akompanis porketo, kiu tranoktadis ankaŭ en la menciita stalo.La ŝtelantoj elektis malluman nokton, malfermis senbrue stalpordegon, surŝuigis hufojn de bovinoj en gumajn botojn kaj forpelis ilin trans la paŝtejo en najbaran vilaĝon. Estas bezone aldoni, ke antaŭ la nokto pluvegis kaj kampaj vojoj estis forte kotaj. La stalpordego restis malfermita kaj la porketo ankaŭ forlasis la stalon por sekvi la gregon. La ŝtelantoj tion malkovris malfrue, matene, kiam apud la bovinoj kuŝis la porketo postulanta ankaŭ matenan manĝaĵon.

La farmistino jam frumatene malkovris, ke ŝiaj la plej bonaj bovinoj mankas kaj tuj telefonis al policejo. Venis maljuna serĝento kune kun sia hundo. La hundo ne estis edukita postsekvi spurojn, sed la spuroj de juna porko estis tiom legeblaj en la kota vojo, ke jam antaŭtagmeze la ruzaj ŝtelantoj troviĝis en distrikta malliberejo kaj la 3 bovinoj, liberigitaj de gumbotoj, denove paŝtis sin sur la paŝtejkampo.La porketo, kiu alvenigis la serĝenton al la ŝtelantoj, ricevis pli bongustan kaj pli bonkvalitan manĝaĵon ol ĉiutage.

El balkana presaĵo esperantigis Stanislao Ŝtefan